

## Csilla BERÉNYI (1976 – 2018)



La 2-an de junio 2018 forpasis Csilla BERÉNYI, hungara membro de ILEI.

En 1996 Csilla eklernis la germanan kaj poste Esperanton en la filologia fakultato de la Universitato ELTE en Budapeŝto, ŝi diplomiĝis kiel instruisto pri Esperanto kaj la germana lingvo. La diplomlaboraĵon ŝi verkis pri la komparo de Esperanto-kursoj, en kiu laboro ŝin helpis la gvidanto de LINGVO-Studio, László Szilvási.

Ŝi instruis la germanan kaj Esperanton al mezlernejoj kaj plenkreskuloj ekde 2001 en Budapeŝto (post sia transloĝiĝo al urbo Pécs, ankaŭ tie). Ŝi laboris en la distrikto Csepel, poste en diversaj lingvolernejoj (ekz. Ring, Danubius).

Csilla instruis la germanan en ELTE inter 2010 kaj 2011 kaj Esperanton en Nemzetközi Oktatási Központ (Internacia Instrua Centro). Ŝi instruis Esperanton ĉefe al junuloj kaj

mezaĝuloj en la lingvolernejo LINGVO-Studio de la Budapeŝta Esperanto-Centro ĝis la jaro 2017. Multaj centoj da studentoj ŝuldas al ŝi sian Esperantan lingvoekzamenon. Ŝi estis unu el la plej bonaj instruistoj en la lando...

Krom la instruado, ŝi estis spertulo pri pedagogiaj temoj kaj helpis elprovi la novajn pedagogiajn ilojn. Ekde la jaro 2004 ŝi estis ekzamenanto pri Esperanto en la ekzamencentro Origo.

Ekde sia universitata studado ŝi partoprenis en la junulara movado kaj en la laboro de la teamo de Kultura Esperanto-Asocio kaj estis membro de ILEI-HU.

En sia libertempo ŝi dancis en kursoj kaj ŝi eĉ entreprenis prezentadojn kun sia salso-grupo en la Esperanto-baloj en Budapeŝto (ĝis la unua apero de la malsano en 2013).

En 2016 ŝi ne nur partoprenis en la Konferenco de ILEI en Nyíregyháza, sed instruis Esperanton al la konferencanoj.

Ŝi preskaŭ ĉiam ĉeestis la Pedagogiajn Tagojn de ILEI-HU en Budapeŝto, ankaŭ la lastan en oktobro 2017, sed eĉ en aprilo 2018, grave malsana ŝi partoprenis konferencon de Faka Asocio de Lingvolernejoj (NYESZE).

Pri sia malsano ŝi parolis al mi la unuan fojon en Nyíregyháza, kaj ankaŭ poste tra la reto. Sed ŝi forte luktis kaj esperis, ke ŝi resaniĝos.

Kiam nia koleginino Enikő Sereghyné Zengő forpasis, Csilla kontaktis min el la hospitalo kaj skribis: „Ankaŭ min malĝojigis la forpaso de Enikő, laŭ miaj kuracistoj povas esti, ke baldaŭ mi povos ĝui ŝian ĉeeston inter la anĝeloj...”. Poste ni kune klopodis kolekti la biografiajn informojn – eluzante la periodojn, kiam ŝi fartis pli bone – por la kazo, se la malsano venkos.

La adiaŭa ceremonio okazis la 4-an de julio en Budapeŝto.

Kara Csilla, la malsano venkis, sed la vera heroo estas vi, ni ne forgesos vin.

*Jozefo NÉMETH*